



# INFORMILO

Numero 4/eo  
Septembro 2004

## Rezolucioj de la kongreso de SAT

Meze de aŭgusto 2004 okazis la 77a Kongreso de *Sennacieca Asocio Tutmonda* (SAT), en Bratislavo, Slovakio. La sekvaj rezolucioj estis adoptitaj de la kongreso:

### Deklaracio:

La 77a Kongreso de SAT, kunveninta de la 14a ĝis la 21a de aŭgusto en Bratislavo,

- \* lanĉas solenan alvokon al la registaroj de landoj, kiuj ankoraŭ ne subskribis la Konvencion de Otavo, ke ili rapide subskribu ĝin, por ke universaligu tiu Konvencio pri la detruo de kontraŭpersonaj minoj kaj pri la malpermeso de ilia uzo, produktado kaj stokado;
- \* emfazas la nepran neceson de kultura kaj kleriga laboro por batali kontraŭ nescio kaj dogmemo, kiuj estas gravaj obstakloj al paca kaj senperforta forigo de la nuna fia sociordo;
- \* atentigas, ke vortoj kiel "klasbatalo", "kamarado", "socialismo", "laboristo", kvankam ilin misuzis diversaj reĝimoj kaj sociaj grupoj, priskribas daŭran realecon, kaj ke estas tasko de nia asocio redoni al tiuj vortoj ilian ĝustan signifon;
- \* alvokas ĉiujn progresemajn esperantistojn aliĝi al SAT kaj kunagadi en ĝi;
- \* alvokas progresemajn neesperantistojn kunhelpi per siaj propraj rimedoj por levi la nivelon de la mondskala perlingva komunikado ĉe la laboristaro, por kiu celo Esperanto prezentas la plej taŭgan solvon.

### Gvidrezolucio:

La 77a Kongreso de SAT, alvokas la SAT-anaron

- \* helpi per lingva kontrollegado por certigi la kvaliton de la eldonaĵoj de SAT;
- \* kunlabori en la nun fondita Poresperanta Fako de SAT;
- \* kunhelpi riĉigi la kulturpaĝojn de SAT;
- \* solidarece helpi al kamaradoj sen retaliro per laŭpeta disponigo de la jam pretigita materialo;
- \* diskonigi publike la situacion de la malliberigitaj PORTOS-anoj.

La Kongreso alvokas la membrojn de la SAT-frakcioj diskonigi SAT en siaj respektivaj politikaj medioj kaj raporti pri siaj agadoj en sia frakcia rubriko en Sennaciulo.

Ne forgesu, ke SAT estas unuavice la SAT-anoj. Pensu, diskutu kaj poste mem plenumu viajn agadproponojn!

**Krome**, dum la Kongreso kunvenis la diversaj frakcioj de SAT: komunistoj, liberecanoj, sennaciistoj, ekologiistoj kaj Ĉielarko (grupiganta defendantojn de alternativaj manieroj de seksorientiĝo). Dum tiuj frakciaj, fakaj kaj ĝeneralaj aranĝoj, oni diskutis kaj aprobis diversajn alvokojn, inter kiuj rezolucion petantan la eliro de la "koaliciaj" trupoj for de Irako.

Venonta kongreso okazos en somero 2005 en Kroatio.

## Niaj dokumentoj

Ni daŭrigas la publikigadon en nia retpaĝaro de tre interesaj dokumentoj. Nun kelkaj el ili estas (aŭ estos) troveblaj en papera eldono. Du el la plej gravaj ĵus eldonitaj temas respektive pri la rilato de Esperanto al anarkiismo kaj al marksista socialismo.

### Esperanto kaj anarkiismo

«Anarkiistoj estis inter la pioniroj de la disvastigo de Esperanto. En 1905 fondiĝis en Stokholmo la unua anarkiisma Esperanto-grupo. Sekvis multaj aliaj: en Bulgario, Ĉinio kaj aliaj landoj. Anarkiistoj kaj anarki-sindikatoj, kiuj antaŭ la Unua Mondmilito apartenis al la nombre plej granda grupo inter la proletaj esperantistoj, fondis en 1906 la internacian ligan *Paco-Libereco*, kiu eldonis la *Internacian Socian Revuon*. Paco-libereco unuiĝis en 1910 kun alia progresema asocio, *Esperantista Laboristaro*. La komuna organizaĵo nomiĝis *Liberiga Stelo*. Ĝis 1914 tiu organizaĵo eldonis multe da revolucia literaturo en Esperanto, interalie ankaŭ anarkiisma(...). En 1907 la internacia anarkiisma kongreso en Amsterdamo faris rezolucion pri la afero de internacia lingvo, kaj venis dum la postaj jaroj similaj kongresaj rezolucioj. Esperantistoj, kiuj partoprenis tiujn kongresojn, okupiĝis precipe pri la internaciaj rilatoj de la anarkiistoj(...) ne hazarde oni ame nomis Esperanton ankaŭ *laborista latino*. La laborista Esperanto-movado disvolvis multflankan internacian interŝanĝadon (...)

En la germana *Lexikon der Anarchie* (1998) aperis teksto de Will Firth pri la rilatoj inter anarkiismo kaj Esperanto. Ĝi estis ampleksigite publikigita de *Maldekstra Forumo Berlin*, kaj nun ni diskonigas ĝin en Esperanto kaj en hispanlingva traduko.

### La ideologia stumblo inter Socialismo kaj (la) Internacia Lingvo

«Ja ekzistas pluraj komunaj karakterizoj inter, unuflanke, la baza socialisma ideologio kaj, aliflanke, la principo de internacia lingvo kaj ties signifo por la laboristaj esperantistoj. Jen kelkaj ekzemploj de tiuj komunaj karakterizoj:


- unue, en ambaŭ vivas internaciismaj ideoj pri unueco de la laboristoj en la mondo
- due, socialismo estas ligita al scienca planado de la socio, kaj Esperanto, kiel konstruita lingvo, bone kongruas kun tiu koncepto
- trie, komuna internacia lingvo, kiel Esperanto, iel subfosas la nacian lojalecon, do la ŝovinismon kiu mem nutras militismon kaj kapitalismon - du malamikoj de socialismo
- kvare, la praktika uzo de Esperanto estas grava por la edukado de laboristoj, do, por ilia emancipado, kiun socialismo same alstrebas.

Konklude, la socialisma ideologio estas principe tre akordigebla kun la demokratia spirito de Esperanto. De kie venas tiu nekomprene inter ambaŭ? Kio funde malĝlatas?»

“Esperanto kaj ideologioj: kiel rolis kaj rolu la esperanto-movado politike?” estis la temo de altnivela simpozio organizita je la 20a de Oktobro 2001 far la Esperanto-klubo *La Progreso* en Belgio. La hispandevena belga aŭtoro pri la laborista esperantista movado, Alberto Fernández, faris treege utilan prelegon, konstatante la negativan sintenon de la ĉefaj socialistaj teoriistoj, kaj defendante la reciprokan bezonon de socialismo kaj esperanto. Lia prelego estis poste publikigita en *Internaciisto* kaj en *Sennacieca Revuo*, kaj ni nun publikigis ĝin rete kaj tradukis en la hispanan lingvon. La broŝuron vi povas mendi ĉe ni. Certe vin interesos la konkludo:

«La konvinko, ke socialismo estas nur internacie realigebla, laŭ mia opinio, estas funde prava(...). La dedukto, ke internacia socialismo nepre bezonas Internacian Lingvon estas tute logika, ĉar sen komuna Internacia Lingvo tia internacia ordo konservus kulturalan diskriminacion, do ne-egalrajtajn popolojn, do ĝermojn de ŝovinismo - kaj tio ne plu estas socialismo. Internacia Lingvo estas esenca por alporti pli demokratian bazon en internaciajn rilatojn. Cetere, kiu ajn progresema mondkoncepto kiu celas konstrui mondon pli justan por ĉiuj, estas apenaŭ realigebla se ĝi ne inkluzivas pozitivan aliron al la ideo kaj realigo de Internacia Lingvo. Ambaŭ estas interligitaj. Ili sin reciproke bezonas.»

## Niaj libroj



» Dum la SAT-Kongreso prezentiĝis nova libro: “Vivbruligita”, la priskribo de la terura travivaĵo de virino atakita ĉar ŝi ne deziris simple subigi sin al la devigita vivo kiun oni deziris altrudi al ŝi. Tradukita de nia kamarado Remy Bouchet, pri la eldono zorgis SAT kaj ĝi estos baldaŭ trovebla en nia Libroservo.

» La libro “7000 tagoj en Siberio”, verkita de Karlo Ŝtajner, tradukita de Kreŝo Barkoviĉ kaj eldonita de SAT en 1983, estis retradukita al la ĉina lingvo pere de la Esperanta versio. Ĝi estis prezentita dum la Universala ĉijara kongreso. La esperanta versio estas aĉetebla ĉe ni.

» Nova libro por informi pri Esperanto al hispanlingvanoj: “El esperanto, lengua y cultura” estis prezentita dum la eŭropa kongreso de Bilbao. Ĝi estas jam havebla ĉe nia asocio.

## Laboristaj Olimpikaj Ludoj

Pretas kiel divido inter la diversaj sportlokoj el la Antverpena distrikto Hobokeno tute nova placo. Ĝi ricevos la nomon "Jacques Schram parko". Per ĝi la distrikto volas honorigi la onklon de la samnoma prezidanto de la Plenumkomitato de SAT, kiu dum la tuta aktiva vivo batalis por propagandi laboristan sporton. Dum multaj jaroj li estis delegito de la Popola-Olimpiko aŭ, kiel li ĉiam nomis ĝin, la Laboristaj Ludoj.

Fine de la 19a jarcento fondiĝis Laborista sport-movado, kiu laŭ strukturo kaj aspekto multe similis al la neŭtrala aŭ burĝa varianto. Tamen relative rapide post la fondiĝo, ĉe la movado komenciĝis ideologia profiligo. La movado iris en la manojn de maldekstraj pensantoj kaj pli kaj pli oni propagandis: ke sporto ne estis sistemo per kiu oni gajnas monon aŭ gloron, sed per kiu oni plibonigas la sanon aŭ la ĝeneralan vivkondiĉon.

Dum la 30-aj jaroj la sport-vivo kaj precipe la laboristoj sportistoj influigis de la Popolfronto. La kataluna “Esport Popular” kombinis sporton kun la politiko. Postulo estis al ĉiu alirebla, nekomerca formo de sport-ebloj kie la valoroj egaleco, frateco, solidareco kaj honesta ludo ne estus vanaj konceptoj. Samtempe sporto estis ilo en la politika batalo por pli da demokratio kaj kontraŭ la faŝisma idearo.

En 1936, kontraste kun la Berlinaj Olimpikoj, manipulitaj de la Hitlera reĝimo, estis antaŭvidita alternativa organizado en Barcelono. La Popol-Olimpikoj komenciĝus la 19-an de julio kun diversaj manifestacioj kaj festoj kaj daŭrus unu semajnon. Bedaŭrinde julio 1936 eniris la historion pro tute alia kaŭzo ol la festo de la Popol-Olimpiko.

La Popol-Olimpiko el Barcelono tamen ilustras la potencon kiu povas veni el engaĝiĝo kaj entuziasmo. La valoro de ĉi tiu ekzemplo eskapas al ĉiu limigo de tempo kaj spaco.

*Artikolo kompleta pri tiuj iniciatoj estas legebla en nia retpaĝaro, kaj ni povas sendi ĝin papere al ĉiuj interesitoj.*

### **Aliaj artikoloj lastatempe haveblaj en nia dokumentaro:**

- Pri la kreado de alia Israelo en Balkanio
- Pri la loko de la Eklezio en la demokratia socio
- Pri la taŭroludoj
- Pri la monarkio
- Pri la civila malobeo
- Pri la manipulado rilate la celebradon de la batalo de Normandio
- Pri la hispana revolucio (prelego dum SAT-Kongreso en 1986, fare de nia veterana kamarado Eduardo Vivancos)

## AMIKECA RETO

Ĝi kreiĝis en 1987 dum la SAT-kongreso en Bulonjo-ĉe-Mar. Ĝi estas senprofita asocio kun sindonemaj kunlaborantoj sub la protekto de SAT.



La Amikeca Reto eldonas dujaran gvidlibron, kiu entenas pli ol 400 adresojn en 40 landoj. Eblas aĉeti ĝin ĉe ĝiaj regionaj Perantoj, kiuj vendas laŭ lokaj prezkutimoj. Por tiuj adresoj kun multaj informoj, oni celas la faciligon de homaj rilatoj, ĉefe dum vojaĝoj. La retanoj, kies adreso aperas en la adreslibro, plezure akceptas homojn kun la deziro paroli E-on, ekkoni novajn personojn, interŝanĝi spertojn kaj ideojn (aliĝado estas senpaga).

**INTERRILATOJ** Diversaj indeksoj ebligas profundajn rilatojn tra vizitado de sociaj ejoj (domoj, laborejoj, asociejoj, sindikatejoj, ktp), tra diskutado pri multaj temoj, aŭ tra kuna aktivado laŭ la lokaj eblecoj (biciklado, boatado, skiado, plukado, ktp...)

Per tiuj eblecoj disvolviĝas nova maniero por vojaĝi, kiu jam ne plu meritus ricevi la nomon «turismo». Oni ne serĉu ekzotikaĵojn, sed ja personan riĉiĝon per variaj interŝanĝoj.

**PARTNEROJ.** Pro tio, La Amikeca Reto favorigas ĉiujn homajn interrilitojn, ĉu leterajn, ĉu konkretajn. Eblas ja trovi korespondantojn, sed ankaŭ partnerojn por kuna agado ia ajn. Eblas interŝanĝi ĉion : la domon, la infanojn, ktp... Pro multaj kialoj, la reciproka gastigado estas grava ebleco proponata.

**HELPADO.** Nia deziro estas helpi la vojaĝantojn. Pluraj kaj variaj fak-konsilantoj atendas demandojn (pri sano, juro, tranoktado, transporto, biciklado, ktp... kaj por senesperuloj). Estas eĉ fak-konsilanto pri dokumentado, kiu povas doni al vi fakan bibliografion de E-libroj pri preciza mondparto aŭ socia temo (por prepari vian vojaĝon).

Komercaj aferoj estas fremdaj al ni, sed tamen ni donas indikojn pri eventuala tranoktado en proksima gastejo, hotelo aŭ privata ĉambro.

**TRASERĈADO.** La Amikeca Reto vivas danke al la Internacia Lingvo, kio ebligas rektajn kaj fundajn kontaktojn. sen ia lingva barilo, la reto celas la forpelon ankaŭ de kulturaj baroj, de etnaj miskomprenoj, de individuaj malamoj. Ĉiaj raporto, studoj, verkoj por tion konstrui estos bonvenataj.

***Bonan Vojaĝon !***

## Muziko

» Memoru ke SATeH povas vendi diskojn de *Vinilkosmo* en Hispanio. Ne nur haveblas laborista muziko, sed ĉiutipa materialo, kia ja ekzistas en la esperanta kulturo.

» Ni kunlaboris kun Ĥaena Esperanto-Asocio en la okazigo de ateliero pri Esperanto en Festivalo *Etnosur* en Alcalá la Real, fine de julio 2004. Ni montris kaj vendis diversan materialon.



---

**Por kontakti kun ni:**

**Asociación Izquierda y Esperanto SATeH (SAT-en-Hispanio)**

Poŝtokesto (Apartado de Correos) 8537, (ES-)28080-Madrid

[satenhispanio@eresmas.com](mailto:satenhispanio@eresmas.com)

**<http://satenhispanio.eresmas.com>**